



Boletín

Nº 420 Oktobro - Decembro 2017



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPAÑA ESPERANTO-FEDERACIO

Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 420

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):

admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto. Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor

Raúl Martínez

Alejandro Escobedo (prezidanto
de HEJS)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Karaj legantoj,

La jaro 2017 estis iom ĥaosa en nia lando, sed ni kiel esperantistoj ne interesiĝas pri tiaj problemoj, ĉar nia celo estas paco kaj amikeco kaj unuiĝo inter la popoloj, pro tio ni aranĝas ne unu, sed tri eventojn kune kun la UK de Lisbono. En Madrido okazos la HK kaj la kongreso de ILEI, kaj en Badaĥozo la IJK, ne nur por gejunuloj, sed por ĉiuj, kiuj decidos sperti la gravan eventon, kaj pro tio ni devas pripensi la aferon ĉeesti.

Ĝis nun la listo de partoprenontoj en la UK estas iom pli alta al tiu de Portugalio, tio signifas ke ni interesiĝas, sed tio ne sufiĉas, ni estas multaj homoj kaj mi ne vidas konatajn homojn, kiuj nepre ni devos ĉeesti kaj eĉ kunlabori. En Boletín, kiel vi povas konstati, preskaŭ ĉiam aperas la samaj kunlaborantoj kaj mi konas multajn homojn, kiuj povas kaj devus kunlabori per novaĵoj de iliaj asocioj, verketoj, poeziaĵoj, ĉio estos bonvena en nian Redakciejon. La bulteno estas ĉies kaj ĉiuj rajtas kontribui por riĉigi ĝian enhavon.

En ĉi numero aperas la kutimaj artikoloj pri literaturo, novaĵoj pri grupoj kaj asocioj, raportoj pri vojaĝoj, tradukaĵoj kaj aliaj pri diversaj eventoj kaj okazaĵoj. Vi rajtas publikigi vian ideon, fotoĵon, spritaĵon, ĉio estos benvena se temas pri Esperanto aŭ en Esperanto. La revuo havas spacon por vi, profitu la okazon.

La Redakcio
Ángel Arquillos

ENHAVO

Salutvortoj	1
Nova kasisto de HEF	3
Nekrologe	3
Nova eldono de Miguel Hernández “Poeto de l’ popolo”	4
Fundación Esperanto	5
ILEI 77-a Hispana Kongreso de Esperanto...	6
Pri Grupoj kaj Asocioj	11
Simpozio en Varsovio	18
Esperanto kaj Sociaj Sciencoj	19
Hispanaj esperantisto en Varsovia omaĝo al Zamenhof	21
Industrias kaj Andanzas de Alfanhuí	24
La 25-a Internacia Semajno de la Kulturo Tossa de Mar	26
Alzacaj basileaj kaj kuriozaĵoj	29



**GAJAN NOVAN JARON 2018
AL NIAJ LEGANTOJ DE BO-
LETÍN KAJ AL NOVAJ ABO-
NANTOJ, KIUJ MALKOVROS
VENONTJARE KE NIA BUL-
TENO OFERTAS AMUZAJN**

NOVA KASISTO DE HEF

Jesús García Iturrioz



Naskiĝinta en Portugalete (Bizkajo) en la jaro 1955 kaj esperantiĝinta en 1980, lia agado rilate al Esperanto ĉefe disvolviĝis ene de la E-Grupo de Bilbao, en kiu li okupis diversajn postenojn: prezidanto, kasisto, sekretario, voĉdonanto, bibliotekisto, ...

Siatempo, ankaŭ organizanto de diversaj vojaĝoj eksterlanden por la gejunuloj, kun la celo partopreni E-laborbrigadojn: Pollando, Hungario, Bulgario, ... iĝis lokoj, kie la ĵus bakitaj esperantistoj perfektigis sian lingvan lertecon ene de internacia etoso.

Li ankaŭ estis ĉeforganizanto de la kongresoj hispana (1989) kaj eŭropunia (2004), ambaŭ okazintaj en Bilbao.

De antaŭ multe da jaroj li estas la redaktoro de "Nia Ponto", oficiala organo de la E-Grupo de Bilbao kaj ankaŭ aŭtoro de diversaj skribaĵoj kaj artikoloj en E-gazetoj kaj bilbaoaj ĵurnaloj. Lastatempe, kunordiganto de la traduko hispanen de "la Z-strato", de R. Dobrzynski kaj aŭtoro de "Historio de la internacia lingvo Esperanto en Bizkajo".

Profesie, li estis instruisto pri matematiko en la Vaska Universitato ĝis sia emeritiĝo en 2016. Laŭlonge de kelkaj lernejoj, li gvidis E-kurson, agnoskita de tiu universitato kiel oficiala studobjekto.



NEKROLOGE

Forpasis la 94-jara esperantistino Dolores Martínez Martínez, de Premiá de Mar (Barcelono), kie ŝi gvidis esperanto-kurson kaj estis membro de HEF dum multaj jaroj kaj tre ŝatis Boletín, kiun ŝi legis kaj ĝuis dum multaj jaroj. Sur sia memor-karton, ŝi petis skribi la frazon "Kiam mi mortos, neniu ploru pro mi. Mi estis la plej feliĉa virino en la mondo".

Ripozu pace.

NOVA ELDONO DE “MIGUEL HERNÁNDEZ, POETO DE L’ POPOLO”

IV CONGRESO INTERNACIONAL
MIGUEL HERNÁNDEZ
POETA EN EL MUNDO



15, 16, 17 Y 18 DE NOVIEMBRE DE 2017
ORIHUELA / ALICANTE / ELCHE



Okaze de la kunmemoro en 2017 de la 75-a datreveno de la morto de la granda poeto Miguel Hernández, Hispana Esperanto-Federacio publikigis la duan eldonon de la antologio de poemoj tradukitaj al Esperanto.

Kiel estas bone konate, la unua eldono de la antologio estis publikigita en 1988, kun la titolo “Miguel Hernández, poeto de l’ popolo”. La tradukisto estis lia konata preskaŭ sammomulo Miguel Fernández, kiu ankaŭ zorgis pri la enkonduko kaj notoj. Ĝi estis eldonita de la Esperanto-grupo de Valencia, okaze de Hispana Kongreso okazinta en tiu urbo, kiel numero 4 de la serio Hispana Literaturo.

En tiu ĉi kazo, HEF rekte zorgis pri la eldonado. Ni eksciis pri tiu kunmemoro kaj pri la organizado de diversaj agadoj, kaj specife pri la organizado de internacia Kongreso pri la poeto, kun la titolo “Miguel Hernández, poeto en la mondo”, sinsekve en la urboj Orihuela (kie li naskiĝis), Alikanto (Alicante, kie li forpasis) kaj Elche (kie vivis lia familio), organizita de la institucioj kaj universitatoj de tiu provinco.

Do, ni proponis al la organizantoj la prezenton de nia libro en tiu Kongreso, kaj ili tre volonte konsentis.

La malgranda tempo postulis streĉan laboron de diversaj kunlaborantoj, unualoke, kompreneble, de Miguel Fernández kiu reviziis la verkon, korektis kaj aldonis plian materialon. Menciindas ankaŭ Antonio Valén kiu reviziis la tekston, kaj ĉefe Pedro Sanz, zorganto de la libroservo de SAT-en-Hispanio, kiu okupiĝis pri la engaĝigo kaj praktika eldonado.

La prezento okazis la 16-an de novembro en la sidejo de la kongreso, en kulturinstitucio “Gil-Albert” de la urbo Alikanto, fare de la prezidanto de HEF, José A. del Barrio, kaj la tradukisto, Miguel Fernández.



Krome, ambaŭ partoprenis la saman tagon matene en la akademia parto de la Kongreso, prezentante referaĵon pri la traduko de hispana literaturo al Esperanto, kaj la defioj de la tradukado de la verkoj de Miguel Hernández.

Ambaŭ eventoj estis tre favore akceptitaj de la publiko, inklude de la ĉefaj specialistoj pri la aŭtoro, kun kiuj eblis ligi ampleksajn kontaktojn.

La libro estas akirebla en la Libroservo de HEF. La oficiala prezo estas 12 eŭroj, sed membroj de HEF ĝuas specialan prezon de 10 eŭroj. Rabato estas havigebla ankaŭ por grupoj kaj libroservoj kiuj mendas kolektive.

FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2017

La helpoj programitaj por 2017 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 416 de "Boletín" (okt-dec.2016) de HEF.

Kiel oni scias, ni disponas je tre modesta kvanto por helpoj. Sekve, ni decidis helpi al nur unu propono.

Fine ni decidis destini al José Antonio del Barrio (Prezidanto de HEF) pro la elspezoj por partopreno en Pollando en Kongreso pri Zamenhof. Krome, iel ni volas agnoski ties kvalitan, longan kaj intensan agadon favore al Esperanto.

Krome, kiel kutime, en nia sidejo estis organizitaj E-kursoj.

PROJEKTOJ POR 2018

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2018.

Lastatempe, la elspezoj kreskis kaj la enspezoj malpliigis. Tial, principe la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 300 €.

Lorenzo Noguero

(Sekretario de "Fundación Esperanto")



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
ASOCIACIÓN INTERNACIONAL DE ESPERANTO



77-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO 51-a KONGRESO DE ILEI

MADRIDO, 20-28 julio 2018

UNUA KOMUNIKO

LA KONGRESOJ

Madrida Esperanto-Liceo (MEL), Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), invitas vin al partopreno en la 77a Hispana Kongreso de Esperanto kaj al la 51a Kongreso de ILEI, kiuj okazos fine de julio 2018 en la urbo Madrido (Hispanio), tuj antaŭ la Universala Kongreso en Lisbono.

La Kongresoj estos parte sendependaj kaj parte koincidaj, kaj do oni povas partopreni en ambaŭ aŭ nur en unu el ili, depende de siaj disponeblo kaj ŝato.

La konkretaj datoj estos:

Hispana Kongreso de Esperanto: 20 - 22 julio 2018

Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: 21 - 28 julio 2018

LA LOKO

Madrido, la ĉefurbo de Hispanio, estas la plej loĝata urbo de la lando, kun iom pli ol 3 milionoj da loĝantoj. Ĝi estas moderna kaj tre turisma urbo, kun multe da atrakciaĵoj, ampleksa kultura propono kaj tre altira distra vivo.

La kongresoj disvolviĝos ĉefe en la universitata areo, okcidente de la urbo, proksime al parkoj kaj samtempe integrita en la urbo mem.

LA KONGRESA TEMO

La kongresoj havos kiel bazan motivaĵon la moton “La kultura heredaĵo de Esperanto”.

Ĝi estos ankaŭ la ĉeftemo de kleriga simpozio, kiu disvolviĝos ene de la ILEI-kongreso, en kunlaboro kun la universitato UNED (ŝtata universitato de malĉeesta edukado)

LA PROGRAMO

La Kongresa komitato kaj Estraro de ILEI nun pretigas programon, kiun oni konkretigos en venontaj informoj. Kiel kutime ĉe Hispanaj Kongresoj kaj tradicie ĉe ILEI, ĝi estos certe riĉa el kultura, kleriga, distra kaj turisma vidpunktoj. La kulturo, loka kaj Esperanta, havos gravan rolon. Kompreneble, ne mankos prelegoj, atelieroj, babiladoj, ekspozicioj, kursoj, E-instruista trejnado, distraj vesperoj ktp.

Indiku en la aliĝilo kaj kontaktu la organizantojn se vi mem deziras kontribui al la programo.

TURISMA PROGRAMO

Ni konatiĝos kun la urbo Madrido, kaj ankaŭ kun aliaj proksimaj, ege interesaj el arkitektura kaj historia vidpunkto.

Madrido estas tre turisme altira urbo, kun multaj vidindaĵoj kaj vigla surstrata vivo. Ni havos okazon funde ekkoni la urbon per specialaj programeroj.

Krome, oni antaŭvidas vizitojn al proksimaj urboj, kiel Toledo, Segovio, Eskorjalo aŭ Alcalá. Ni konkretigos tiujn informojn en venontaj komunikoj.



GASTIGADO KAJ TRANSPORTO

La Kongresoj okazos en studenta rezidejo en la universitata areo, kie ankaŭ eblos gastigi je konvena prezo. La kostojn ni publikigos en aparta bulteno. Krome, Madrido disponas pri ĉiaj gastigeblaj, de la plej luksaj ĝis la plej moderprezaj. La organizantoj povos helpi vin trovi lokon, precipe se vi bezonas lingvan helpon.

Madrido estas facile atingebla. Ĝi disponas modernan flughavenon Madrid-Barajas, al kiu flugas kompanioj el la tuta mondo. El la flughaveno komfortaj metroo kaj trajno veturigas vin rekte al la urbocentro.

Ĝi estas atingebla facile per trajno kaj aŭtobusoj.

Madrido estas konektita per aŭtoŝoseoj kun aliaj Eŭropaj landoj kaj kun ĉefaj urboj en Hispanio kaj Portugalio. Oni antaŭvidas facilan kaj senpagan parkadon en la universitata areo, kie disvolviĝos la kongresoj.

Ene de la urbo, la publika transportsistemo estas fidinda kaj komforta.

Post la ILEI-kongreso, ni antaŭvidas organizitan komunan transporton per aŭtobuso al Lisbono, por partopreni la Universalan Kongreson. Ankaŭ eblas vojaĝi tien per oftaj flugoj kaj per nokta trajno.

LA KONGRESA KOMITATO

Prezidanto: Manuel Parra

Sekretario: Santos Olán

Kasisto: Ricardo Biurrun

Komitatoj: Félix Jiménez, Águeda Biurrun, José A. del Barrio

ILEI-estrarano pri kongresoj: Radojica Petrović

ILEI-estrarano pri financoj: William - Vilĉjo Harris

KONTAKTO

Eblas kontakti la organizantojn ĉe la adreso kongreso2018@esperanto.es.

Poŝta adreso: Hispana Esperanto-Federacio. Rodríguez San Pedro 13, 3^o-7; ES-28015 Madrid (Hispanio). Telefonoj: +34-914 468 079; +34-638 547 104

Pri faka, kleriga kaj organiza programo de la ILEI-Kongreso: Radojica Petrović

<radojica.petrovic.rs@gmail.com>, aŭ: Bul. Oslobodjenja 36, RS-3200 Ĉaĉak, Serbio

Reĵeto de la kongreso: <http://www.esperanto.es/kongreso>.

Kongresaj retpaĝoj de ILEI: <http://www.ilei.info/agado/konferencoj.php>

FB-grupo ILEI-Kongresoj: <https://www.facebook.com/groups/ILEI.Kongresoj/>

KOTIZOJ KAJ ALIĜILO

Kotiztabelo de Hispana Kongreso de Esperanto, Madrido, 20-22 julio 2018

Aliĝperiodoj	ĝis 31.03.2018	ĝis 30.06.2018	post 30.06.2018
Membro de HEF aŭ Madrida E-Liceo (1)	30 €	35 €	45 €
Ne membro	40 €	45 €	55 €
Juna membro de HEF aŭ MEL (3)	15 €	20 €	25 €
Junulo nemembranta en HEF/MEL (3)	20 €	25 €	30 €
Infano kaj junulo malpli ol 18 jara (2)	5 €	5 €	5 €

Kotiztabelo de ILEI-kongreso, Madrido, 21-28 julio 2018

Aliĝperiodo*:	ĝis 31.03.2018		ĝis 30.06.2018		post 30.06.2018	
Aliĝkategorio**:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI(1)	60 €	35 €	70 €	40 €	85 €	50 €
Ne-membro	75 €	50 €	90 €	55 €	105 €	65 €
Infano ĝis 18 j. (2)	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €
Junulo(3), handikapulo(4)	30 €	20 €	35 €	25 €	40 €	30 €
Familiano(5)	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozia(6)	30 €	30 €	35 €	35 €	40 €	40 €

Komuna kotiztabelo por ambaŭ kongresoj en Madrido, 2018

Aliĝperiodo*:	ĝis 31.03.2018		ĝis 30.06.2018		post 30.06.2018	
Aliĝkategorio**:	A	B	A	B	A	B
Membro de ILEI, HEF aŭ MEL(1)	68 €	40 €	80 €	46 €	97 €	59 €
Ne-membro	86 €	59 €	103 €	63 €	120 €	74 €
Infano ĝis 18 j. (2)	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €	5 €
Junulo(3), handikapulo(4)	35 €	25 €	40 €	30 €	45 €	35 €
Familiano(5)	50%	50%	50%	50%	50%	50%
Nur-simpozia(6)	30 €	30 €	35 €	35 €	40 €	40 €

KOTIZ-KONDIĈOJ

* Validas kotizo laŭ la dato de pago

** Kotizkategorioj:

A. Ĉiuj landoj escepte de tiuj ĉi-sekve sub B.

B. Ekssocialismaj landoj de orienta Eŭropo; landoj de Latinameriko, Afriko, kaj Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko).

(1) Membro de ILEI (resp. HEF aŭ MEL) estas tiu, kiu jam pagis membrokotizon por la jaro 2017. Honoraj membroj ĝuas 100%-an rabaton.

(2) Infanoj kun akompananto kaj junuloj aĝaj ĝis 18 j. je 31 dec. 2017 pagas la infanan kongresan kotizon.

(3) Junulo: kiu naskiĝis post la 31-a de decembro 1987.

(4) Handikapulo, bonvolu sendi al ILEI atestilon.

(5) Familiano: Se aliĝas du aŭ pliaj samfamilianoj, unu el ili pagu plenan kotizon kaj la cetera(j) (escepte de infanoj, junuloj, handikapuloj kaj aliaj kiuj jam ĝuas alikaŭzan kotizrabaton) pagu 50% de la respektiva kotizo el la kotiztabelo. Familianoj estas konsiderataj: edz(in)o, ge(bo)filoj, ge(bo)patroj, geavoj, genepoj, koramik(in)o.

(6) Unu- aŭ 2-taga kotizo: Por nur-simpozia, aŭ ajna partopreno dum nur unu aŭ du tagoj, validas aparta, malpli alta kotizo. Por partopreno longa pli ol 2 tagoj validas la plena kotizo laŭ la kotiztabelo.

Pagmanieroj

(1) Tra ING-banko:

Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo. Aldonu 5 € se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.

(2) Tra UEA:

Al ILEI-konto ilek-a ĉe UEA, indikante "ILEI-Kongreso 2018".

(3) Al HEF:

Al konto de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) ĉe banko BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo.

(4) Al MEL:

Al konto de Madrida Esperanto-Liceo (MEL) ĉe banko ARQUIA: ES66 3183 2800 1700 0132 8957, kun indiko: "ILEI-Kongreso 2018" plus nomo.

(5) Per Paypal

Paypal-konto de HEF: admin@esperanto.es (krompago de 2 €)

Aliĝiloj

Estas disponebla reta aliĝilo, kun ĉiuj necesaj informoj ĉe:

<https://goo.gl/forms/PhZlGEynNUn54ngm2>

Ekzistas papera aliĝilo, kiun oni povas pleniĝi. Poste oni sendu ĝin al: adreso de Hispana Esperanto-Federacio en str. Rodríguez San Pedro 13, 3^o-7; ES-28015 Madrid (Hispanio) aŭ ĝian skankopion al retadreso: kongreso2018@esperanto.es.

Privateco

Viaj nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro. Vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu.

Oni planas havigi liston de nomoj kaj retadresoj al ĉiuj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke vi ne aperu en tiu listo. Ceteraj informoj estos arkivataj ĉe HEF kaj ILEI kaj utiligataj nur por internaj celoj.

Oni antaŭvidas fotadon kaj filmadon dum la kongreso, kaj posta diskonigado per la reto. Se vi ne deziras esti filmata, bonvolu tion indiki tie ĉi.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
HISPANA KONGRESO FEDERACIO



77-a HISPANA E-KONGRESO
51-a KONGRESO DE ILEI
MADRID, 20-28 julio 2018

ALIĜILO

por 77-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO (20-22 julio 2018)
kaj / aŭ 51-a KONGRESO de ILEI (21-28 julio 2018) en Madrido, Hispanio

Aliĝo al: Hispana kongreso
 ILEI-kongreso
 Ambaŭ kongresoj

Persona nomo (*)		Familia(j) nomo(j) (*)	
˘ Ino/ ˘ Viro	Naskiĝdato (por statistiko aŭ rabato)		
Loĝadreso			
Urbo/ regiono (*)		Lando / Teritorio (*)	
Retadreso			
Telefonnumero(j)			
Ĉu vi bezonas vizon por eniri la kongreslandon? (1)			˘ Jes/ ˘ Ne
Ĉu vi konsentas aperigon de via retadreso en partoprenlisto? (*)			˘ Jes/ ˘ Ne
Kotizkategorio (*)			
Kotizo (*)		Donaco	Entute (*)
Celo de la donaco:			
Pagmaniero (2) (*)			
Alvendato		Forirdato	
Kiun lingvon vi pretas prezenti en la Lingva festivalo?			
Aliaj kontribu- kaj kunlabor-proponoj?			
En kiuj kursoj, seminarioj, trejnado vi ŝatus partopreni?			
Komentoj			

(*) Devigaj informoj

(1) Se vi bezonas inviteleteron por peti vizon, bonvolu skribi al kongreso2018@esperanto.es por interkonsenti pri detaloj.

(2) Kopion de via pagordono sendita al banko aŭ CO de UEA bonvolu sendi per poŝto al adreso de Hispana Esperanto-Federacio en Madrido, aŭ al kongreso2018@esperanto.es. La efektiva dato de pago kaj via aliĝo estos tiu de ricevo de la pago.

Kaze de rezigno, 50% de la kotizo estos repagitaj se aliĝinto malanoncas sin pro valida kaŭzo antaŭ la 15-a de junio de la kongresa jaro.

Per subskribo kaj sendo de tiu ĉi aliĝilo mi akceptas la kotizkondiĉojn kaj tabelojn kaj la partoprenkondiĉojn.

Loko, dato _____ Subskribo: _____

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

ANDALUZIO

MALAGO

Zamenhof-tago en Torrox (Malago)

Okaze de la 30a datreveno de la nomiĝo de avenuo kiel Avenida Esperanto de la urbeto Torrox (Malago), grupo de geesperantistoj el Malago kaj Sevilto kunsidis ne nur por celebri la Zamenhof-tagon, sed ankaŭ por fari omaĝon al la loka esperantisto, Antonio González, kiu partoprenis la inaŭguron de la Avenida Esperanto antaŭ tridek jaroj, sed forpasis poste pro malsano. AEU donacis al la familio memorplakon post prelego pri



la vivo kaj agado de nia samideano. En la evento ĉeestis la urbestro Oscar Medina kaj la sekretario kaj grupo de lokaj maljunuloj, kiuj malfermis sian salonon por ni kaj José María Rodríguez, sekretario de AEU profitis la okazon prelegi pri Blas Infante, la patro de la patrujo Andaluzio, kiu estis esperantisto, kaj per diapozitivaj bildoj, ni ĝuis belajn bildojn pri tiu epoko kaj la kolekton da libroj, kiujn li havis en sia biblioteko.



La urbestro entuziasmiĝis kun la etoso kaj la belsono de la lingvo esperanto kaj senafekte ofertis al ni taŭgan kaj tre interesan salonon en la urbocentro por la venonta Andaluzia Kongreso de Esperanto, kiun ni planas organizi tien.

Sur la foto maldekstre estas mi kun la juna urbestro Oscar Medina kaj la maljuna honora prezidanto de AEU Andrés Martín, kiu ĉeestis en la evento, antaŭ 30 jaroj, ĉar tiutempe li estis dum pli ol dekvin jaroj la prezidanto de nia Asocio.

Ángel Arquillos

ARAGONO

TERUELO

La ĉi-jara ĝenerala kunveno de LIBERANIMO, esperanto-asocio de Teruelo okazis je la 11a de decembro. Ni parolis pri la agadoj faritaj dum la jaro 2017 (precipe pri la organizo de la 76 hispana esperanto-kongreso), kaj pri la projektoj por la venonta jaro.

Post la analizo de la kontoj ni reelektis la membrojn de la estraro de la asocio

Profitante la kunsidon, ni ankaŭ festenis la Zamenhofan Tagon per komuna vespermanĝo



BURGOS

LA PRADA



Dum la pasinta, 24-a oktobro, okazis en La Prada (Burgos) muzika kaj arta festivalo, kun multaj kursoj kaj atelieroj. Partoprenis proksimume kvardek homoj kaj multe el ili muzikistoj.

Mi profitis la okazon por organizi atelieron pri esperanto.

Multe el ili partoprenis la kurseton kie ili lernis la bazajn gramatikajn regulojn kaj ĉiuj, entuziasme, kantis la infankanton "Dek bovinoj"

Miguel G. Adúriz

EŬSKIO

ZAMENHOF-TAGO (BILBAO)



Ni kuniĝis la sabaton 16an en nia sidejo.

La celebradon malfermis Jesús M. García Iturrioz per prelego pri la historio de Esperanto en Bilbao kaj ĉirkaŭaj urbetoj. Al tio sekvis vigla debato en kiu partoprenis kelkaj ĉeestantoj, kiuj alportis kromajn interesajn informojn.

Post la debato, oni okazigis la surbrustigon de verdaj steloj al la gelernantoj de la lasta kurso. Nia Prezidanto, Pako López, ankau regalis ilin per donaco de libroj, samkiel al David Redondo, la entuziasma gvidanto de tiu kurso.

Kaj por fini, ni ĉiuj gustumis la manĝaĵojn kaj trinkaĵojn alportitajn de la partoprenantoj, kiuj, ene de vigla kaj gaja etoso, havis la okazon denove renkontiĝi kaj praktiki Esperanton.


GALEGIO

TRADUKO DE LIBRO DE LA GALEGA LITERATURO

Aperis jam la traduko al Esperanto de la plej populara libro el la nuntempa galega literaturo, kun la titolo *Memoraĵoj de kampara knabo*. Verkita de Xosé Neira Vilas, ĝi rakontas la historion de Balbino, malriĉa knabo en la Galegio de la mezo de la 20-a jarcento. Pri la traduko zorgis la filologo Suso Moinhos el Vigo.

La galega literatura estis ĝis nun tre malbone reprezentita en la lingvo Esperanto, kun tradukoj de apenaŭ iuj pecoj plus la verko *Viveroj* (galege *Retrincos*) de Castelao. La nuna verko estis publikigita de Mondial kaj estis inkludita en la serio *Oriente-Okcidento* sub la patronado de UEA por agnoski la celojn de interkompreniĝo de UNESKO.

La vendredon, 3an de novembro, en la Biblioteko Xosé Neira Vilas de Vigo (Galegio) okazis la oficiala prezentado de la libro fare de ĝia tradukisto. Suso partoprenis ankaŭ la 17an de oktobro, en la Universitato de Vigo en kolokvo, kun prelego "Kiel traduki kulturemojn. Memoraĵoj de kampara knabo en Esperanto", en kiu partoprenis ankaŭ la profesoro Klaus Bochmann pri la germanigo de la libro, kaj organizata de la esplorgrupo Bitraga (Biblioteca da tradución galega), kiun konsistigas instruistoj de la Fakultato de Filologio kaj Tradukado.



EKSPOZICIO EN CELANOVA

La 15an de decembro, okaze de la Tago de la Libro en Esperanto, kaj ĝis la 27a de la sama monato, estis inaŭgurita en la t.n. *Domo de la Poetoj* de Celanova (provinco Oŭrenso, Galegio) ekspozicio pri Esperanto, per la paneloj aranĝitaj de HEF. La ĵo estas la naskiĝdomo de Curros Enríquez, popola poeto de la 19-a jarcento, kiu plej multe kontribuis, kun Rosalía de Castro, al la renaskiĝo de la literaturo en la galega lingvo. Kiel fermo de la ekspozicio, la 26-an de decembro la prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri la internacia lingvo.

“Kiel konsekvenco, la 28-an de decembro aperis en “La Región”, la ĵurnalo de la provinco Oŭrenso, intervjuo kun la prezidanto de HEF, kiu okupis preskaŭ unu tutan paĝon (kvar kolumnojn el la kvin de la loka informo)”

KANARIAJ INSULOJ

GRANDA KANARIO

Post varmegaj someraj tagoj, feliĉe venis la aŭtuno kaj, kun ĝi, la komenco de la aktivajoj de nia "Grupo Esperantista de Gran Canaria". Nova E-kurso komenciĝis. Por ĉi tiu okazo ni elektis la lernolibron *Esperanto per rekta metodo* de nia slovaka samideano Stano Marček. La kursgvidanto estas prof. Antonio Sarmiento, Delegito de UEA, Universitata Diplomito en la dujaraj kursoj de d-ro Régulo Pérez ĉe la Universitato de La Laguna kaj iame hispana reprezentanto de ILEI en la Kongreso de San Marino. Post



varba kampanjo, kiu evidentiĝis sukcesa, dank' al belaj kaj allogaj afiŝoj, aliĝis al la kurso ĉirkaŭ 20 personoj entute. Ili ne nur ĉeestas la klasojn, sed ankaŭ partoprenas en aliaj aranĝoj kiel estas la kultura evento, dum kiu nia plej veterana grupano, Lauren Parada, donace transdonis la libron *El hombre que desafió a Babel*, a la Direktorino de la Publika Ŝtata Biblioteko, s-ino Rosa Coruña. Preskaŭ la tuta lernantaro ĉeestis la simpatian momenton eĉ kun la esperanto-flago! Ni aldonas porokazan foton.

La dua foto estas farita en teraso de populara komerca centro, kie ni amuze kuntradukis kaj kunkantis la furoran pasodoblon "Que Viva España", okaze de nia internacia festeto "Un mundo sin fronteras" ("Mondo sen landlimoj"). Tiu kanzono vere fariĝis la "himno" de la monda turismo kiu daŭre frekventas Hispanion. Nuntempe ĝi furoras en-kaj ekster interreto, kaj ĝi jam fariĝis "virusa". Kompreneble ni entuziasme kantas ankaŭ "La Espero-n" en solenaj okazoj.

Dum la tuta jaro, vizitadas nin samideanoj el plej diversaj landoj kiuj ŝatas turismumi

aŭ loĝi ĉi tie precipe dum la vintraj monatoj. Belgino Christiane Geudens ĉiujare restas kun ni dum ses monatoj. Aliaj samideanoj jam sinanoncas kaj ni ricevas ilin per etenditaj brakoj, tutkore!

Kun granda entuziasmo, niaj membroj sekvas la novaĵojn pri la diversaj preparoj rilate al la gravaj eventoj kiuj en venontaj monatoj okazos en Hispanio kaj en Portugalio. Kiel en la pasinta jaro, espereble kelkaj el niaj grupanoj partoprenos en iuj el la okazontaj kongresoj.

Antonio Sarmiento



MADRIDO

CELEBRADO DE LA ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO



Madrida Esperanto-Liceo celebris la Internacian Tagon de Esperanto (Zamenhof-Tago) la sabaton 16an de decembro, en la kultura centro Centro Sociocultural Mariano Muñoz (Asociación Vecinal La Cornisa), en la kvartalo Pradolongo-Usera.

La mateno estis dediĉita ĉefe al la prezentado de libroj, memorante la originon de la celebrado kiel Tago de la Esperanto-Libro.

Unue, Miguel Fernández prezentis la kvar librojn, kiujn oni publikigis al li

ĉi-jare: *Vamos, vemos / Ni iras, vidas; Tagoj kaj ruinoj; La defio vivi kaj krei; kaj Miguel Hernández, poeto de l' popolo* (dua eldono).

Poste, Jorge Camacho prezentis la plenan poemaron de Zamenhof, ĵus eldonitan, kaj sian propran poemaron “Brulvunde”.

José María Salguero (“Kani”), kiu vojaĝis el Don Benito (Badaĥozo), prezentis la ĵus aperintan libron, eldonitan de Sennacieca Asocio Tutmonda, “Antaŭ unu jarcento”, kiu prezentas diversajn tekstojn rilatajn al la Unua Mondmilito kaj Esperanto.

Poste homoj kune tagmanĝis en la ejo mem, kaj la vespero estis dediĉita al ludoj kaj aliaj senĝenaj aktivadoj.

Entute partoprenis iom pli ol 20 esperantistoj.

Krome, lunde, oni organizis alian aktivadon, orientitan al la ekstero, en loko relative proksima: oni prezentis en asocio “Marx Madera”, en Orcasitas, la libron “Tagoj kaj ruinoj”, de Jaime Grau Casas, en traduko de Miguel Fernández.

La aranĝo estis organizita de SATEH kaj de Liceo de Esperanto de Madrid. La prezenton enkondukis la madrida esperantistino kaj soci-kultura aktivulino Mati Montero kaj disvolvis la tradukinto de la verko. Ĉeestis esperantistoj,

ĉiamuloj ĉe la centro kaj eĉ najbaroj de aliaj kvartaloj de la distrikto Usera.



VALENCIO

GUARDAMAR DE SEGURA (ALIKANTO)

La 15-an de decembro prezentis sin publike la grupo esperantista de Guardamar del Segura (Alikanto). La prezento okazis en la “Casa de Cultura” de la urbo. Ĉeestis la urbestro, kiu malfermis la agadon kaj la urbkonsilisto pri kulturo. Poste parolis la anoj de la grupo, ĉiu pri diversaj aspektoj de Esperanto: kio ĝi estas, la gramatiko, la historio, la agado kaj historio en la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj, kaj pri la historia pioniro Ricardo Codorniu, kiu havis rektan rilaton al Guardamar, ktp. Oni montris filmetojn kaj ankaŭ ekzemplojn de konversado kaj deklamado de poemoj. Poste oni regalas la ĉeestantojn per malgranda invito. La salono estis ornamita per libroj, revuoj kaj alia materialo. La publiko montris intereson kaj oni antaŭvidas organizi kurson. Ankaŭ filmis la loka televido kaj distrikta televido.

La dimanĉon 17-an de decembro la grupo partoprenis per budo en la “Tago de Interkulturismo kaj asocioj”, eksplikante la celojn de Esperanto kaj de la grupo.

La grupo havas tre ambiciajn planojn. Oni nun organizas ekspozicion por la komenco de la jaro, kaj aliajn agadojn profitante la Tagon de la Arbo, profitante ke Ricardo Codorniu, ligita al Guardamar, estis la unua prezidanto de la unua tuthispana Esperanto-asocio, komence de la 20-a jarcento.

VALENCIO (urbo)

Okaze de la Zamenhof-tago en Valencio, la 16an de decembro, mi prelegis dum du horoj, pri legado kaj komentario de esperantaj proverboj. Mi intencis montri la preskaŭ 200 proverbojn kiujn mi kolektis el diversaj fontoj (ĉefe de Esperanto Proverbaro, verkita de la Majstro), sed oni povis nur resti en nia grupejo dum du horoj kaj mi nur povis montri ĉirkaŭe 100 proverbojn...



Kiam la prelego finiĝis, la ĉeestantaro povis demandi kion ajn ili volis, kaj oni parolis dum alia duonhor.

Poste ni ĉiuj iris al restoracio Carme, kaj tie oni havis nian kutiman bankedon, en tre bona etoso. Aŭgusto Casquero, kiu ne tre bone fartas, ankaŭ venis kaj oni parolis, ridis kaj ĝuis la Esperantan etoson.

Elias Hernández Capdevila

SIMPOZIO EN VARSOVIO



THE HERITAGE AND LEGACY OF LUDWIK LEJZER ZAMENHOF BETWEEN JUDAISM AND ESPERANTO

GEOP INTERDISCIPLINARY RESEARCH WORKSHOP
13 -15 DECEMBER 2017



De la 13a ĝis la 15a de decembro estis organizita en Varsovio Internacia Simpozio pri la intelekta heredaĵo de D-ro Zamenhof, okaze la centjariĝo de lia morto. La simpozio estis celebrata en la Muzeo pri la polaj judoj, POLIN.

En ĝi partoprenis esploristoj de diversaj landoj, spertaj pri Esperanto, sed ankaŭ aliaj kiuj pritraktis diversajn aspektojn de la figuro de Zamenhof, kiel lian sintenon al la t.n. “juda demando”.

Inter ili troviĝis la barcelona esploristo Javier Alcalde, kiu parolis pri la rilatoj de Esperanto kaj la pacisma movado en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento, kaj mi mem, nome de Fundación Esperanto, pritraktante la temon “Kiel la Deklaracio de Homaranismo estis publikigita en Madrido?”.

Mi komentis la kuriozan cirkonstancan ke, malgraŭ la ofta aserto ke okcidenteŭropaj esperantistoj kontraŭis la politik-religiajn ideojn de Zamenhof, tamen la ĉefa verko en kiu li esprimis sian ideologion estis publikigita ĝuste en Hispanio. Kiel sciante, la iniciato ŝuldiĝis al grupo de tri framasonaj aktivuloj, kaj mi esploris iliajn ideojn kaj motivojn, krom la specialaj cirkonstancoj de la socio en Hispanio en tiuj unuaj jardekoj de la 20-a jarcento.

La teksto, en la angla, aperos plej verŝajne en libro eldonota komence de la venonta jaro en eldonejo specialiĝanta pri judaj aferoj.

José Antonio del Barrio

ESPERANTO KAJ SOCIAJ SCIENCOJ



Raporto-resumo pri la agado okazinta la 21an de aprilo de 2017 ĉe la Fakultato de Edukado de la Universitato de Sevilo, farita de la loka aktivula universitata sevila grupo por la varbado ĉe la akademio.

Dum antaŭa agado (legu <http://personal.us.es/vmanzano/eo/pdf/16dec.pdf>) la sama organizantaro decidis ebligi seminarion ĉe la universita-

to por montri la estantecon kaj la fortan estontecon pri E-o kiel akademia komunikilo. Sed ni sukcesas fari la seminarion, per dek horoj dum la sama tago, kaj ĉi tie oni povas legi pri kion okazis.

La enhavo komenciĝis per prelego pri Esperanto fare de José Antonio del Barrio: *Kio estas, kiu estas la historio, kiel vivas ĝin la esperantistoj, kio okazas nun tra la mondo*. Li parolis pri diversaj aspektoj de la lingvo kaj klare montris, ke E-o estas pli ol lingvo. La ĉeestantoj rimarkis la vastan aktivecojn de Esperantujo.

Poste, Juan Diego Diaz prelegis pri Esperanto kaj akademiaj eblecoj: *La monda strukturo de edukado kaj esplorado ĉirkaŭ E-o kaj per E-o. Kelkaj sukcesaj ekzemploj*. Juan Diego organizis sian prelegon ĉirkaŭ tri punktoj, laŭ la origino de la agadoj: akademiaj kaj edukadaj institucioj, neakademiaj, kaj mikstaj agadoj.



Dum la cetera tempo de la mateno, la lertega instruisto Antonio Rodríguez, gvidis la unuajn paŝojn de la studentoj per la lernateliero *Malpli parolu pri Esperanto kaj pli parolu Esperanton*. Antonio inspiriĝis de la rekta metodo. Li trafis faris sian kontribuon stimule al ĉeestantoj por parolante partopreni. Dum pli malpli tri horoj (antaŭ kaj post tagmanĝo), li sukcese montris la logikon kaj la praktikon de la internacia lingvo.

La unua vesperakto estis montri *videaj partoprenoj*. La malaga profesoro Carlos Spino-la aranĝis tiun punkton. Diversaj esperantistoj el la mondo salutis la ĉeestantojn kaj parolis pri Esperanto kaj Universitato: Orlando Raola (Usono), Alejandro López de Vergara (Ĉilio), Irina Gorchanova (Rusio) kaj Abdurahman Junusov (Dagestano). Ankaŭ Shayah de Bone Farti (Francio-Hispanio) parolis pri monda projekto, kaj Dirce Sales (Brazilo) donis al ni belan kanton.

Dum la lastaj tagoj de marto kaj la unuaj de aprilo, ni faris enketon pri la angla kaj Esperanto en la Universitato de Sevilo, ĉefe en la universitata areo de sociaj sciencoj (juro, ekonomio, edukado, psikologio, filozofio kaj turismo). En la studfako "Dezajno kaj analizo de datumoj en psikologio", tri laboraj grupoj de studentoj faris enketon al 395 universitataj junuloj. La demandaro ĉefe temis pri sintenoj ĉirkaŭ la angla kaj Esperanto: *kion vi pensas? kion vi scias? kio estas ebla, ĝusta kaj plezuranta laŭ vi?* Dum la evento, la studentoj prezentis resumon pri la rezultoj. Poste, José Luís Rodríguez kaj Pilar Guerrero, studentoj de psikologio kaj du el la fondintaj membroj de la loka universitata grupo, faris mallongan prezentadon pri la grupetaj agadoj. José Luis kaj Pilar parolis pri niaj esploradoj per intervjuoj, fakaj literaturo-serĉadoj, kaj enketoj; ankaŭ pri la varbadlaboroj per tabulego, sociaj retoj, kunvenoj, ktp. Nun, ni komencis prepari ambician agadon por la venonta jaro.

La lasta prelego estis farita de Vicente Manzano-Arrondo pri *akademia subpremado ĉirkaŭ la fabrika modelo kaj la lingva maljusteco*. La kontribuo temis pri kiel diversaj fortoj konstruas akademian sklavecon kaj kiel la kolegoj adaptiĝas al tiu fenomeno. Ĉe tiu sistemo, ni povas rimarki la rolon de la angla lingvo kaj la problemoj produktitaj de ĝi. Kaj ni povas proponi Esperanton kiel alireblan solvon.

Kiel konkludoj de la fina plensesio, la ĉeestantoj partoprenis opiniante pri la enhavo kaj la afero de la seminario. Poste, ili surpapere montris kion ili pensas kaj sentas post partopreni. Ni povas ĉefe sintetizi pri (1) kiuj ne konis la lingvon konfesis surprizantan malkovraĵon: ĝi estas reala kaj alloga elekto; (2) la lingva subpremado sukcesas ĉar ĝi estas nevidebla kaj ĉie ĉeestanta; (3) ili iluziĝis pro la unua sperto lernante la lingvon, interparolante kun aliuloj per la unuaj frazoj; la atelier rezulto tuŝis iliajn korojn; (4) la celo disvastigi la internacian lingvon ĉe la universitato bezonas longan vojon, ĉar la institucio ne estas loĝata de herooj, sed de ĉiutagaj saviĝuloj; (5) oni bezonas ne forgesi proponi Esperanton kune kun la defendo de la denaskaj lingvoj, per kiu ĉiuj devas vivi siajn vivon plene.

Por pliscii, vi povas skribi al grupo (esperanto@us.es) aŭ al raportaŭtoro

(vmanzano@us.es)

Ĉi tiu revo daŭras...

Vicente Manzano, Prof. Universitato de Sevilo

HISPANAJ GEESPERANTISTOJ EN VARSOVIA OMAĜO AL ZAMENHOF

La invito trafis nin komence de aŭgusto per mesaĝo el nia bona amiko Irek Bobrzak, de *Varsovia Vento*: la Varsovia Filio de PEA planis organizi duan kulturen renkontiĝon lige kun la 100a datreveno de la Zamenhof-morto kaj oni volis kalkuli je tri hispanoj: Ana Manero, Javier Romero kaj mi mem.

La aranĝo fine okazis en aŭtuno, ĝuste la 21an kaj la 22an de oktobro. Ĉio sugestis familiarecon, intimon, dezirojn omaĝi al la majstro senbrue, lok-skale, et-grupe, sed surbaze de prezentadoj far internaciaj praktikantoj de la E-kulturo, ĉefe sur la terenoj de muziko kaj poezio.

Jam de nia apero en la varsovia flughaveno, la 19an de oktobro, la afableco de niaj gastigantoj manifestiĝis sub la formo de mirinda amikino: Sylwia Citko, kun kiu ni konatiĝis jam en 2016, en Herrera del Duque, kadre de la neforgesebla 75a HEF-Kongreso. Ŝi kondukis gard-anĝele de la komenco ĝis la fino de la kvaro da neforgeseblaj tagoj pasigitaj en Varsovio. Kaj kion diri pri la akcepto fare de la PEA-samideanaro? Vere varma kaj plena de dolĉeco tiel anima kiel manĝaĵa. Kiel korekse estis konstati, ke alia el la homoj de *Varsovia Vento*, Agnieszka Mozer –ĝojo, freŝo, sentivo, sprito...–, jam ĉiama ĉe niaj HEK-oj, estas la filino de esperantistino, Alina, tiel ĉarma kiel ŝi!



La nokto de la 20a aparte belis. La vetero helpis. Ne malvarmis. En la ĝardeno de la radiofonie beltembra-voĉa Irek, oni rostitis mi ne scias kiom da kotletoj kaj kolbasoj. En la ĉe-ĝardena paviloneto, bona etoso, kiu retrovenigis min al mia universitata epoko, i.a. pro la sud-eŭropaneco de multaj el la polaj ĉeestantoj, ĉefe de la skipanoj de *Varsovia Vento*. Ĉe la fino, esperanta torto

ornamita per granda bengala fajro. Mirinde!

La festivalo ekis la 21an. Ni ĝuis la muzikon de Martin Wiese, el Svedio, antaŭ agrabla tagmanĝa paŭzo, kie ni havis la ŝancon paroli kun interesaj geesperantistoj. Posttagmeze, muziko kaj poezio. La dano Kim Henriksen, akompanante sin per sia akordiono, unu plian fojon trenis onin al kunkantado laŭ la taktaj de lia ĉefverko *Sola*. La poezian parton oni komisiis al ni. Tre honoras min, ke la varsoviajventanoj kaj la admirata Roman Dobrzyński jam de la momento de la invito insiste petis min kaj Ana Manero ripeti la deklamon de mia poemo al la Teruelaj Geamantoj, *Konstanta amo transe de la morto*, kiun ni ambaŭ –unue mi en mia originala esperanta versio kaj poste ŝi en mia hispanigo– faris en Teruelo apud ilia maŭzoleo.

Post te-paŭzo, juveleto: la filmo de Roman Dobrzyński *La Esperanto-urbo*, oficiala kromnomo de la germana urbo Herzberg am Harz. Je la 18a, muzika spektaklo, kiun Irek titolis *Bolero en la ĉefa rolo*. Refoje mi sentis min tre honorata de li. Jam de mia kant-recitalo en Herrera del Duque li konfesis sin de ĝi kaptita. Ĝis tioma grado, ke, kiam ŝprucis la ideo aranĝi ĉi duan kulturalan renkontiĝon en Varsovio, li tuj pensis, ke tiu mia prezentado nepras. Plej volonte kaj danke mi akceptis prepari duan version de ĝi por la okazo: *Mia liriko kaj la muziko*. Mi havis la honoron kaj la plezuron kundividi miajn kantojn kaj poemojn kun geamikoj el Pollando, Danlando, Svedio, Hispanio, Slovakio, Hindio kaj Japanio. Elstare helpis min miaj gekompanoj Ana Manero sursceneje kaj Javier Romero ĉe la sonteknika flanko. Mi kaptas ĉi okazon por plej profunde danki ilin.



En la mateno de la 22a, ni vizitis la judan tombejon. Nia ĉefa celo: omaĝi al la majstro, kies restaĵoj kuŝas tie. La vetero ŝajnis nia aliancano por nia memorfesto. Preskaŭ pluvis, kvankam ne malvarmis. El la arboj falis or-tukoj en la formo de flavaj folioj. Ĉirkaŭ la tombo de Zamenhof, kolektiĝis ne magra nombro da diverslandaj geesperantistoj. Oni donis al mi la privilegion –mi denove kaj elkore

dankas la organizantojn– komenci la aranĝon per poemdeklamo. Mi klarigis al ĉiuj, ke, anstataŭ verki poemon por la okazo, mi findecidis deklami mian esperantigon de unu el la plej imponaj funebraj lirikaĵoj el la hispanlingva poezio: *Elegio* [Elegía], de la karmemora hispana poeto Miguel Hernández, mia preskaŭa samnomulo. Mi precizigis, ke tion mi faras ne nur pro la eksterordinara kortuŝa beleco de lia poemo, sed ankaŭ tial, ke ĝuste ĉi-jare oni memorfestas la 75an datrevenon de lia forpaso, kaj tiel mi povas kunigi miajn omaĝojn al tiuj du admirataj homoj: Miguel Hernández, “poeto de l’ popolo”, kaj L. L. Zamenhof, poeto pri la homaro.

La emocio de mi spertita nepriskribeblas. La poemon de Hernández la ĉeestantaro ŝatis tiom, ke en la vespero, jam en la aŭditorio, oni petis min ripeti ĝian deklamon.



Antaŭ la tombo de Zamenhof, post ol mi voĉlegis la versojn de *Elegio*, grupo da polaj geesperantistoj interpretis kanton al li laŭ la taktoj de gitaro. Poste Kim, akompanante sin per sia akordiono, denove kantis sian *Sola*. Mi tre ŝatis, ke li kantis tiun malfunebran kanton ĝuste tiukadre. Li ja donacis, memore al la majstro, sian plej bonan muzikan frukton.



Poste Roman Dobrzyński gvidis nin al la tomboj de pliaj membroj de la Zamenhof-familio kaj kompetente kaj elegante kaj bel-esperante, kiel kutime, raportis pri iliaj historioj. La tago, griza, preskaŭ pluva kaj plena de nostalgiaj kaj teneraj elfluoj, heliĝis laŭ la mezuro kiel ni forlasadis la tombejon.

Posttagmeze, Ana Manero prelegis pri unu el siaj ĉefaj okupoj kiel E-aktivulino: la HEF-bitoteko. Altnivele, alloge, kun akompano de oportunaj lumbildoj. Oni aŭskultis prelegojn far esperantistoj japana kaj hinda kaj poem-deklamon far pola esperantistino. Miaflanke, mi deklamis mian esperantigon de *Baladilla de los tres ríos* [Baladeto pri la tri riveroj], de Federico García Lorca, kaj kantis ĝin laŭ flamenka stilo.

Post la solena fermo, komuna picumado. Sekvis postfestivala aranĝo: oni transformis la PEA-sidejon en studion de *Varsovia Vento* por registri mian voĉon en deklamo de pluraj el miaj lastatempe verkitaj E-poemoj. Tio, samkiel la tuta festivalo, estos elsendita podkaste [<http://www.podkasto.net/>].

Revene al la hotelo, la nokto iĝis jam intima, / kia tre malgranda placo, kiel Lorca bildiĝis en sia *Somnambula* romano, kaj Ana, Javier, Martin Wiese kaj mi, kiuj loĝis sam-



hotele, alprenis la decidon kuntrinki plia(j)n vinpokalo(j)n antaŭ ol iri dormi. Estis vera ĝuo kundividi tiujn momentojn de nia lasta nokto en Varsovio kun la geamikoj, kiuj konsistigis tiun mirindan improvizitan etan rondon familian, kadre de la 100a datreveno de la Zamenhof-morto.

Miguel Fernández

(Daŭrigo)

VI. PRI VENTO KIU ENIRIS UNU NOKTON EN LA ĈAMBRON DE ALFANHUÍ, KAJ PRI LA VIZIOJ KIUJN TIU HAVIS

En unu pluv-nokto malsupreniris en la ĝardenon demalproksima vento. La fenestro de Alfanhuí estis malfermita kaj la vento ekagitis la flamon de lia ole-lampo. Ektremis, sur la muroj, la ombroj de la birdoj. Ekmoviĝis ili dekomence, dubeme kaj svage, kiel neatendita vekiĝo. Alfanhuí vidis el sia lito la agitiĝon de tiuj ombroj sur la muroj kaj la plafono, kaj kiel ili rompiĝis en la anguloj kaj interkruciĝis unu kun la aliaj. Ŝajnis ke lia ĉambro pligrandiĝis kaj pligrandiĝis ĝis iĝi enorma salono. Ankaŭ la ombroj de la birdoj pligrandiĝis kaj multobliĝis pro la agitiĝo de la malgranda flamo de lia ole-lampo. La vento eniris pli kaj pli, plene tra la fenestro, kaj ĝi alportis kvazaŭ muzikon de forgesitaj riveroj kaj de arbaroj.

Je la agordo de la muziko, la flamo dancigis la birdajn ombrojn. Kiel fantomoj aŭ pupoj, ili ekdancis la arkanajn dancojn, la pradancojn de ilia specio, desegnante sur la plafonon de la salono grandegan radon el flugiloj kaj bekoj. Ŝanĝiĝanta rado, luma kaj malpeza kiu giris kaj giris kaj revenigis al la mortintaj ombroj la malnovajn kolorojn de la birdoj. Meze dancis la ardeo de ĉinecaj okuloj kaj movis sian bekon laŭ orgojla ritmo, markante la takton de la danco al la tuta birdaro, kaj la vento similis ĵeti pluvoŝprucojn al iliaj okuloj. Jam la remburitaj birdoj estis malaperintaj el siaj piedestaloj, kvazaŭ la pluvo estus redoninta al ili la vivon, kaj ili estis forflugintaj al siaj ombroj, kiuj dancis sur la plafonon de la salono.


Rompiĝis la silenta kaj soleca brumo kaj vekiĝis forgesitaj vizioj, je la renkonto de la venta kaj pluva muzikoj kun la mortintaj koloroj de la birdoj. Ŝajnis malfermiĝi, meze de la birdo-rado, cirklo en la plafono kien revenis la tuta prakoloraro. La mil verdoj de la ĝangaloj, la blanko de la akvofaloj; kaj, el la tero de la vadbirdoj, la roza kaj cindra koloroj de la marmarĉoj, kun ruĝa suno samnivele de akvo, tremanta sur la ŝlima kaj sangeca surfaco. Ĉe la violflavaj kanejoj, brilis la nigra ŝlimo de la bordoj, tapiŝitaj de malgrandaj serpentumantaj radiketoj, inter mil spuroj de diversaj birdoj. Revenis la blankaj salejoj de la estuaroj kaj la salemaj birdoj kiuj subserĉas per sia longa beko en la kotejojn. Kaj la mara suno de la mevoj kaj albatrosoj, frape sur dezerto el sablo kaj bukcentoj.

Revenis la urba bluo el la tero kaj la hirundoj tredante la arkojn de la turoj, kudrante, per la fadenoj de ties flugo, sonorilmuron al sonorilmuro. La vento ankaŭ malfermis libron de elsekigitaj plantoj kaj ekfoliumis ĝin. La floroj malsekiĝis kaj reviviĝis, grim-pante la murojn de la salono, invadante ĉion, formante densan branĉaron, florenhavan kaj planan je nestoj el kiuj eliris birdoj flugontaj al la luma cirklo de la plafono.

Alfanhuí ne povus respondi ĉu en liaj okuloj estas tenebra soleco kaj en liaj oreloj nesondebla silento, ĉar tiu muziko kaj tiuj koloroj venis el alia flanko, de kie neniam venas la kono de la aferoj; trapasinte la unuan tagon, trans la lasta muro de la memoro, kie naskiĝas la alia memoro: la enorma memoro de la nekonataj aferoj.

Dancis kaj dancis la birdoj la pradancojn de sia speco kaj revenis la interkruĉiĝo de la birdaroj al la sanktaj riveroj. Al Eŭfrato, al Nilo, al Gango, al la riveroj de Ĉinio kun ties nomoj de koloroj. Revenis la tuta elmigranta kaj multkolora geografio de la birdoj, la lumo de la antikvaj teroj.

Poste malaperis la luma cirklo de la vizioj kaj revenis al la muroj la ombrodanco, malhela kaj agitata tiun fojon, kiel sorĉa danco, je



la senvoĉaj frapoj de malklara tamburo; kiel danco de rigidaj fantomoj long- kaj plump-kruraj. Pli rapide, pli kaj pli rapide; kaj la salono fermiĝis kaj malgrandiĝis denove antaŭ Alfanhuí. La danco kaj la ombroj malgrandiĝis, malgrandiĝis, ĉirkaŭ la lampoflamo. Revenis la ombroj, kiel grizaj tineoj, bruligi sian polveton en la flamon. Estis la polveto kiun la vento levis el la sekaj birdoplumoj, kaj ties infinitezimaj polveroj iĝis unumomente inkandeskaj, ripetis, brule, ĉiun koloron, vivan kaj malproksiman de la vizioj, kaj perdiĝis denove en la simpla kaj malgranda lampolumo. Ĉio kolektiĝis en si mem. La vento estis haltinta. La ombroj denove mortiĝis, kvietaj, sur la grizaj muroj; la birdoj mortiĝis en la malplena brilo de siaj vitraj okuloj kaj la lasta oleo supreniris al la flamo, ellacega, drone tra la meĉaj fadenoj. La flamo etiĝis sparkokrepite en la lastaj polveroj, kaj tuj ĝi iĝis fum-eliga cindrero kiu apenaŭ brilis plu, nur en la orkolora latuno de la lampo. Restis en la aero la febla kaj malhelaodoro de la forbruliĝinta oleo kaj ĉio ekstingiĝis. Estis nun malpeza silento kvazaŭ por klara kaj solema voĉo, mateniĝa kanto aŭ paŝado de ĉasistoj.

Tradukita de Kani el la originalo far Rafael Sánchez Ferlosio (Fino de la unua parto)

LA 25-A INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO TOSSA DE MAR 30.9. - 7.10 2017

La jubilea Esperanto-Semajno estis ĉi-jare organizita fare de la nova teamo de katalunaj esperantistoj. La torĉon transprenis la ĉeforganizantino Rosa López. Luis Serrano Pérez, kiu senlace laboris por Esperanto ĝis la lasta momento de sia vivo, forpasis la 24-an de aŭgusto en sia 91^a jaro. Ni omaĝis lin dum la renkontiĝo.

La eventon partoprenis 108 geesperantistoj el 12 landoj (Belgio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irlando, Italio, Latvio, Litovio, Svedio, Svislando). La evento okazis en kvarstela hotelo *Don Juan*. Je dispono estis granda naĝbaseno sur tegmenta teraso, kie kelkaj el ni agrable baniĝis. Ne agrabla estis renkonto kun meduzoj de du partoprenantinoj, kiuj volis ĝui la maron.


Dimanĉe okazis la malfermo de la Semajno. Bonvenigis nin la skabeno de la urbdomo s-ro Sergio Bruno. Pro la balotado por la sendependiĝo de Katalunio la urbestriino Gisela Saladich Parés ne povis ĉeesti la solenaĵon.



La programo estis riĉa kaj tamen restis multe da tempo por ripozi. Okazis du interkonaj vesperoj kun ŝaŭm-vino kaj "moskatel"-vino kaj kelkaj almanĝaĵoj. Krome ne mankis tradicia *cremat*-vespero.

Ateliero pri Esperanto temis pri praktikado de la lingvo, sperte gvidate de Luz Vázquez, kiu ankaŭ prezentis sanigadon de Bruno Gröning laŭ spiritaĵ fortoj. Ana Manero sciigis nin pri la madrida biblioteko Juan Regulo Pérez. Gian Carlo Fighiera prezentis du dramojn de *Shakespeare*: *Macbeth* kaj *Hamlet*.





Ĉiuj bone amuziĝis ĉe la ludo: Kiu volas fariĝi milionulo? inspirita laŭ televida programo "Ĉu vi volas fariĝi milionulo?" En niaj modestaj kondiĉoj ni kontentiĝis nur pri milionulo. Ĝi estis preparita kaj tre lerte prezentata de José Antonio del Barrio (Tonjo). Li ankaŭ informis pri la nuna stato de Esperanto en Hispanio. Thierry Saladin parolis pri la Internacia peticio kaj projekto TUJ! Li ne forgesis vendadi porokazajn T-ĉemizojn.



Aperis nova programero "Peĉakuĉo", en kiu ĉiu partoprenanto devas rakonti en limigita tempo pri difinita temo helpe de bildoj. Komencis Tonjo pri la temo: "Kiel filoj de esperantistoj estas geniuloj", Hubert De Meyere klarigis kiel "Uzi sian kapon", Angel Garcia parolis pri "Kosmaj distancoj kaj vojaĝoj", Martine Demouy promeniĝis nin tra la urbo "Périgueux", Michel Chadelaud informis pri migrado kun sia edzino Annette dum "16 tagoj sur la pado de Kompostelo". André Grossmann prezentis diversajn trukfotojn. Ĝi estis tre interesa programo.

Okazis aŭkcio por akiri iom da mono por la asocio. Kun granda sukceso prezentis ĝin Tonjo. Vendiĝis pluraj donacitaj libroj kaj aliaj esperantaĵoj kun aldonaj objektoj.

Dum la jaŭda vespero la folkloro grupo *Esbart San Pol de Mar* regalis nin per belega spektaklo de tipe katalunaj dancoj. Ĉe la fino estis prezentata danco *sardana* kaj la dezirantoj povis kundanci.



La kutiman programeron de opero anstataŭis deklamado de poezio, kiun iniciatis Angel Argilos ŝatante kaj verkisto de poemoj. Partoprenis pluraj samideanoj. Pri latviaj birdoj kaj kuraĝaj junuloj ni eksciis de Aldis Buŝs. La vendreda vespero finiĝis per kolektiva kantado sub gvido de Jeanne Draime kaj Martine Demouy.



La premio Ada Sikorska estis aljuĝita al Ana Manero pro ŝia meritplena laboro por Esperanto en Hispanio. La nove ellaborita trofeo kun portreto de Ada tre plaĉis al ĉiuj. Ankaŭ Gian Carlo Fighiera ricevis ĝin por rememoro pri sia kara edzino.

Dum la unua duontaga ekskurso okazis gvidata vizito en la urbeto *Tossa de Mar*. La ĉiĉerono konigis al ni ĝian historion kaj montris interesajn lokojn. Impona estas la kastelo, kiu etendiĝas sur la monteto, de kie ni observis la marbordon kaj la vastan ĉirkaŭaĵon. Montrante la E-ŝildon ni povis senpage viziti la urban muzeon.



Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris la belan urbeton *Besalù*. Pro sia ĉarmo ĝi estas invadita de turistoj. Ankaŭ ĉi tie ni ĝuis promenadon kun loka ĉiĉerono kun brila tradukado de José María Salguero (Kani). Estis sufiĉe da tempo por trankvile ripozi, kafumi aŭ bierumi. Ankaŭ glaciaĵoj bongustis.

teraneaj kaj ekzotikaj plantoj kaptis nian atenton. Ankaŭ diversaj kakttoj, bambuoj kaj palmoj troviĝas tie. Ni eĉ gustumis kelkajn maturiĝantajn fruktojn ĵus falintajn de la arbo. Iuj fotiĝis kun papagoj.

En la dua duontaga ekskurso ni promenis kaj admiris la belegan kaj ekzotikan botanikan ĝardenon *Marrimurtra* en *Blanes*. Diversaj medi-

Konklude la E-Semajno bone disvolviĝis. Dankon al la nova teamo pro tre agrablaj tagoj pasigitaj en *Tossa de Mar*.



Liba Gabalda

ALZACAJ KAJ BAZILEAJ KURIOZAĴOJ

Jarojn post la publikigo de mia observado de la svisaj specifajoj, jen mi revenas per nova artikolo sed ĉi-foje pri Alzaco, la franca regiono en la nordoriento de la lando. Tiun koncepton "nordoriento" mi ekstraktos poste. Mi vizitis kvar urbojn: Baselo en Svislando, Mulhouse, Strasburgo kaj Colmar. Kompreneble, mi povus priskribi la plej elstarajn monumentojn kaj muzeojn, sed tiu ne estas mia nuna celo.

La alzacaj vilaĝoj estas fame belaj, sed se vojaĝi trajne, viziti vilaĝojn estas malpli facile. Jam la flugo estis iom aparta, ĉar la aviadilo alteriĝis je speciala flughaveno: ĝi estas la tiel nomata Eŭroflughaveno, ĉar ĝi situas inter la landlimoj de Francio, Svislando kaj Germanio. Ĝi fakte estas en franca teritorio, sed la trilandlimo estas tre proksima kaj pli ol duono de la flughaveno estas mastrumata de la svisaj aŭtoritatoj. Estas klare kiam oni troviĝas en unu aŭ alia parto de la flughaveno, pro diversaj spuroj: depende de tio, la ĵurnaloj estas plimulte germanlingvaj aŭ franclingvaj, la soldatoj aŭ policistoj estas francaj aŭ svisaj, kiam oni eniras novan parton oni vidas afiŝon kun flago de unu el tiuj landoj ks.

Baselo (Basel en la germana, Bâle en la franca, Basilea en la hispana) estas pli proksima al la franca landlimo ol mi pensis. Mi erare kredis, ke Baselo estis sufiĉe da kilometroj for de tie ĉar tiu urbo estas germanlingva. Tipa urba buso sufiĉas por vojaĝi ekde franca vilaĝo al Svislando. La plej tieaj gravaj entreprenoj estas farmakologiaj, ekzemple Roche, kiu plej certe produktas medikamentojn, kiujn mi prenas.



Tiun tagon mem, okazis loka festo: la naĝado en la Rejno. Rejno estas la rivero, kiu fontas en Svislando kaj iras norden ĝis Roterdamo. Homoj ĉiuaĝaj, ankaŭ familie, plonĝas en la riveron kaj naĝetas (ĉefe ili lasis sin treni de la akvoŝtupo) ĝis kajo. Mi trairis ponton por spekti tiun vidindaĵon pli bone kaj malkovri novan kvartalon sed la revenvojo ne evidentiĝis. La strato deklivis suben kaj la sekvonta ponto estis sufiĉe pli alta ol la strato mem, do mi devis reveni sur miaj paŝoj por trairi la saman tuj antaŭe tra la ponton.



Supozeble ankaŭ pro la festo ie ĉie videblis flagoj de la loka kanton. Ties blazono aspektas kiel sakskorno surtruo. Fakte, temas pri episkopa bastono.

La stacidomaj necesoj konfirmis la reputacion de Svislando: ili estis la plej puraj, kiujn mi iam vidis kaj oni devis pagi 2€ (20 svisajn frankojn pli-malpli) por uzi ilin; iom malpli por nur pisi. Eblis ankaŭ duŝiĝi kontraŭ la sama kvanto. Tie estis gardistopurigisto, kiu pasigis pli longe klarigante la funkciadon ol purigante. Krome, li estis grandulo kiu nur parolis en la svisa-germana. Mi pensas, ke li havas duoblan funkcion: purigi kaj eviti, ke homoj eniru senpage kaj senpermeso.

Alia vidindaĵo en la urbo estas la parko Jean Tinguely. Malgraŭ tio, ke la nomo povas sugesti alion, tiu artisto de la komenco de la 20a jarcento estis baselano. Meĥanikaj maŝinoj elegante movas akvon en diskreta bazeno.

Mulhouse estas brustskulptaĵo dediĉita al Dreyfus, la militisto maljuste akuzita je perfido je la fino de la 19a jarcento. Gazetoj kaj homoj subtenis lin pasie aŭ insultis lin akre. En la muzeo de la urbo, kie oni trovas lokajn restaĵojn sed ankaŭ artaĵojn apartenintaj al la plej riĉaj familioj, krome estas ejo por omaĝi tiun homon, kiu punpagis sian komdamnon en kariba prizono dum pluraj jaroj, ĝis kiam oni instigis okazigi novan proceson kaj oni deklaris lin senkulpa.

Aliteme, mi trovis afiŝon pri monpunoj kaze de kontraŭurbaj agoj : po 68€ se ne kolekti la hundfekaĵoj, se pisi surstrate, se kraĉi aŭ sputi maĉgumon sur la pavimon. Kompreneble, oni ankaŭ proponas solvojn. Estas normale, ke oni monpunas tiajn sintenojn sed ĉu po la sama kvanto? La plej interesa muzeo en Mulhouse temas pri la historio de la aŭtomobilo. Inter la 20aj kaj la 30aj jaroj oni dekoraciis la plej luksajn aŭtojn per bestetaj simboloj je la antaŭkapoto. Elstaraj variaĵoj!



En Strasburgo mi uzis la tramvojon, same kiel en Mulhouse. En Colmar nur estis busoj kaj turismaj trajnetoj. Tiu Strasburga tramo anoncis la haltejojn per malsama enkondukita muziko. Mi eĉ senĝene aldonus, ke la melodio iel rilatis al la nomo aŭ sonoreco de la nomo de la haltejo. Ankaŭ

en tramvaj vagonoj surpore oni povis legi reklamojn por labori en apuda Germanio: “*Travailler en Allemagne, warum nicht?*” (eo: Labori en Germanio, kial ne?). En la muzeo pri dekoraciaj artaĵoj mi trovis kokforman horloĝon tre interesan. Mi supozas, ke estas granda horloĝa tradicio ĉar la katedralo enhavas horloĝturon apud la altaro, kiu altiris la atenton de la vizitantoj. Apud la riverbordo kaj la EU-konstruaĵoj oni kreis kolekton de eŭropaj benkoj fare de artistoj de la tuta Unio.

Lastatempe en Francio okazis reorganizado de regionoj, kaj oni kunigis Alzacon, Ĉampanjo-Ardenoj-n kaj Lorenon kaj oni renomis ilin Grand-Est. La nova nomo ne kontentigas multajn, ĉar ĝi plidaŭrigas la stereotipojn pri tiu parto de Francio (senlaboro kaj malvarmo ĉefe).





Colmar estas unu el la plej belaj urbetoj en Francio. Ĉarmaj kanaloj kaj dometoj aparte rimarkindas. En ĝia natura muzeo mi vidis ekzempleron de birdo nomata «smeraldo». Ĝi estas malgrandega. Mi ĉiam aŭdis, ke la kolibro estas la malplej granda birdo. Post posta serĉado, mi malkovris, ke smeraldo estas subspeco de kolibro.

Ankaŭ tie mi vizitis la muzeon de Bartholdi, kiu

estis la aŭtoro de la popole nomata Statuo de la Libero. Senton de cirklofermiĝo mi ekhavis, ĉar tie mi malkovris, ke la unua monumento, kiun mi vidis en Baselo estis verko de tiu skulptisto mem. Temis pri omaĝo kaj danko al la svisoj el la strasburganoj pro la homama helpo, kiun ili ricevis dum la sieĝo de la urbo dum la franc-prusa milito. En la muzeo pri ludiloj troviĝas ludĉevalo, kiu fakte estas triciklo. Tiaj ili estis je la fino de la 19a jarcento. Aliaj interesaĵoj povas esti kontraŭgermana anser-ludo (de la 1a-mondmilita tempo), tipa infanĉambro kun ludiloj de la 80aj kaj 90aj jaroj, originalaj LEGO-aĵoj, grandaj fervojaj pejzaĝaj maketoj aŭ la plej grandaj turboj (t.e., turno-svingiloj), kiujn mi iam vidis.

Se vi iam iris al Francio kaj vojaĝis trajne kaj nun reiras tien eble vi spertos, ke la trajnbiletoj rimarkinde malpli grandigis. Antaŭe, ili apenaŭ povis eniri la monujon eĉ duoble faldita. Nun ili havas la grandon de vizitkarto. Koncerne al la trajnoj aldone, vi eble scias, ke oni devas validigi sian bileton en maŝino (flavkolora en Francio) antaŭ ol envagoniĝi, ne nur en Francio, sed ankaŭ en aliaj landoj. Tio okazas, tial ke la biletoj ne havas konkretan daton: fakte, aperas dato ekde kiam oni povas veturi, do tio signifas, ke se oni ne validigas ĝin, oni povus denove vojaĝi per la sama bileto. Se oni forgesas validigi, oni povas tuj antaŭ la forirfajfo kontakti la kontroliston, kaj tiu ĝentile validigas ĝin. Tamen, okazis al mi iom malsimilan: mi intencis validi la bileton kaj mi erare kredis, ke post pluraj provoj mi sukcesis. Mi riskis sufiĉe altan monpunon; feliĉe la kontrolisto rimarkis, ke mi estis veturanta tuj post la aĉeto de la bileto, kaj ke mi ne intencis agi kontraŭleĝe. Malpeziĝan silentan veon mi elbuŝigis.

La morgaŭon post la atenco en Barcelono ĉiuj ĵurnaloj informis pri ĝi en sia titolpaĝo. Mi miris je tio, ke nenio aperis pri la afero en *Le Monde*. Mi estis forgesinta, ke tiu ĵurnalo estas vespera, do tiu mateno temis ankoraŭ pri la hieraŭa. Ĉu ankoraŭ ekzistas tiaj ĵurnaloj en Hispanio?

Eduardo Berdor



Personaj informoj

BONVOLU SKRIBI MAJUSKLE.

Persona nomo:		Nur por renovigoj	
Familia(i) nomo(i):		Membra numero:	
Poŝta adreso:		Poŝtkodo:	
Urbo:	Provinco/Regiono/Lando:		
Telefonnumero(j)	Identiga numero (DNI/Pasporto):		
Retadreso:	Naskiĝdato:		

Membrokategorio

Ĉiuj membroj ricevas la asocian bultenon ("Boletín"), 4 numerojn jare.

Marku per X la elektitan kategorion:

Kategorioj		Eŭroj	X
OM	Individua membro, ordinara kotizo	32	
	Rabatita kotizo: junuloj (< 30 jaroj), senlaboruloj *	20	
	Senpapa kotizo: ricevas la bultenon nur en elektronika formo **	30	
PM	Protektanta membro	64	
KM	Kolektiva membro	64	

(* Speciala kotizo por junuloj kaj senlaboruloj aŭ aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj; intertraktu kun la estraro de HEF por diskuti la detalojn
 (** Speciala kotizo por anoj kiuj ne deziras ricevi la bultenon en papera formo kaj preferas ricevi ĉiujn komunikojn nur per elektronikaj rimedoj.
 Konfirmu detalojn kun la Estraro

Pagmaniero:

- Pagado rekta per banko (kompletigu la malsupran formularon; en la hispana).
 - Pago per la bankkontoj de HEF (havigu atestilon).
 - TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
 - BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961
 - Pago per la konto helb-m de Universala Esperanto-Asocio (havigu atestilon).
 - Pago per Paypal, ĉe la konto admin@esperanto.es.
 - Pago kontanta en la asocia oficejo.
- Dato: _____ Subskribo: _____

Laŭ la hispana Legi pri datumprotektado (Ley Orgánica 15/99 de 13 de diciembre de Protección de Datos de Carácter Personal), Hispana Esperanto-Federacio informas vin ke viaj datumoj estos aldonitaj al bita datumbazo, propra de HEF, kiun nia asocio utiligos nur por internaj celoj aŭ kun rilato al Esperanto. Per la subskribo de tiu ĉi dokumento, vi permesas tiun ĉi utiligadon. HEF ne donos viajn datumojn al eksteraj organizaĵoj, krom pro leĝaj kialoj. Vi povas aliri la informojn, kaj modifi aŭ forigi ilin, per mesaĝo al FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO, Ref. DATOS, C/ Rodríguez San Pedro, 13, 3ª - 7, 28015 Madrid.

En cumplimiento de la Ley Orgánica 15/99 de 13 de diciembre de Protección de Datos de Carácter Personal, le informamos que sus datos están incorporados en un fichero digital propiedad de la FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO (FEE), cuyo uso es exclusivamente para gestiones internas propias de la FEE, así como para el envío de publicaciones e informaciones relacionadas con el esperanto. Con la firma de este documento, consiente expresamente este uso de sus datos. Le informamos además, que la FEE no cederá estos datos a terceros salvo lo que marque la ley en materia de información a las Administraciones Públicas, y que puede ejercer sus derechos de acceso, rectificación, cancelación y/u oposición, previstos en la citada Ley, dirigiendo un escrito a FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO, Ref. DATOS, C/ Rodríguez San Pedro, 13, 3ª - 7, 28015 Madrid.

DOMICILIACIÓN BANCARIA

Titular de la cuenta:	
Banco o caja:	
Dirección de la oficina bancaria:	
Código postal:	Localidad:
IBAN: <input type="text"/>	
prefijo	entidad
sucursal	D.C.
cuenta	

Muy señores míos:

Les ruego atiendan con cargo a la cuenta arriba indicada los recibos que le sean presentados por la Federación Española de Esperanto en concepto de cuota anual, hasta nueva orden.

Fecha: _____ Firma del titular: _____